**Kiam ni renkontiĝu? (A)**

Vi volas iri en kinejon kun via partner(in)o. Trovu tagon kaj tempon kiam vi ambaŭ havos tempon! Jen via agendo – notu la respondojn de via partner(in)o!

***Parolekzemploj:***

A: Ĉu vi havos tempon lundon, inter la 3a kaj la 6a (posttagmeze)?
Ĉu vi havos tempon lundon, de la 3a ĝis la 6a (posttagmeze)?
Ĉu ni povos renkontiĝi lundon, inter la 3a kaj la 6a?
Ĉu ni renkontiĝu lundon, inter la 3a kaj la 6a?

B: Jes, tiam mi havos tempon.
Ne, tiam mi ne havos tempon, ĉar mi ludos tenison.
Ne, tiam mi volos / devos ludi tenison.

| | **Lundo** | **mardo** | **merkredo** | **ĵaŭdo** | **vendredo** | **sabato** | **dimanĉo** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **15.00-18.00** | | renkontiĝi kun amiko | | | iri naĝi | viziti la avon | |
| **18.00-20.00** | Teatro | | kurso pri la angla lingvo | | | | |
| **20.00-22.00** | | komputila kurso | | rokkoncerto | | | |

**Kiam ni renkontiĝu? (B)**

Vi volas iri en kinejon kun via partner(in)o. Trovu tagon kaj tempon kiam vi ambaŭ havos tempon! Jen via agendo – notu la respondojn de via partner(in)o!

***Parolekzemploj:***

A: Ĉu vi havos tempon lundon, inter la 3a kaj la 6a (posttagmeze)?
Ĉu vi havos tempon lundon, de la 3a ĝis la 6a (posttagmeze)?
Ĉu ni povos renkontiĝi lundon, inter la 3a kaj la 6a?
Ĉu ni renkontiĝu lundon, inter la 3a kaj la 6a?

B: Jes, tiam mi havos tempon.
Ne, tiam mi ne havos tempon, ĉar mi ludos tenison.
Ne, tiam mi volos / devos ludi tenison.

| | **lundo** | **mardo** | **merkredo** | **ĵaŭdo** | **vendredo** | **sabato** | **dimanĉo** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **15.00-18.00** | teniso | | piedpilkludo | | | | ekskursi |
| **18.00-20.00** | | kurso de la sveda lingvo | | iri al la dentisto | labori (ĝis la 10a horo vespere) | danckurso | ekskursi |
| **20.00-22.00** | kinejo kun la patrino | | | rokkoncerto | | danckurso | ekskursi |